# Ĉu vi scias kiom mi amas vin?

Sam McBratney kaj Anita Jeram



Libere Tradukita de : Nikola kaj Martin Markarian



La eta leporo devis iri al la lito, sed li tenis sin ankoraŭ tre forte ĉe la longaj oreloj de la granda leporo.

La eta leporo volis fakte esti tre certa, ke la granda leporo bone aŭskultis lin. « Divenu kiom mi amas vin », li diris.



« Ho », diris la granda leporo « mi ne pensas ke mi povas diveni tion. »

« Tiom multe », diris la eta leporo
kaj etendis siajn braketojn tiom
kiom li povis.



La granda leporo havis multe pli longajn brakojn. « Sed mi amas vin TIOM », li diris.



Ho, tio estas multe, pensis la eta leporo

« Mi amas
vin tiom
kiom mi
kapablas
atingi »,
diris la eta
leporo.





« Mi amas vin, tiom kiom mi kapablas atingi », diris la granda leporo.

Tio estas tre multe, pensis la eta leporo. Se mi nur havus ankaŭ tiom longajn brakojn.

Tiam la eta leporo havis bonan ideon.

Li staris sur siaj manoj kaj etendis siajn gambojn sur la arbon.




« Ĝis miaj piedfingroj mi amas vin », li diris.

« Kaj mi amas vin ĝis viaj piedfingroj », diris la granda leporo kaj svingis la etan leporon en la aeron.



« Mi amas vin tiom kiom mi povas alte salti ! » diris la eta leporo ridante…



… kaj li saltadis.



« Sed mi amas vin tiom kiom mi povas alte salti! », diris la granda leporo ridante, kaj li saltis tiom alte ke liaj oreloj tuŝis la branĉojn.

Impona saltado, pensis la eta leporo. Se nur mi povus salti tiom bone.



« Mi amas vin la tutan vojon ĝis la rivero », diris la eta leporo.

« Mi amas vin ĝis la rivero kaj trans la montojn », diris la granda leporo.



Ho, tio estas tre malproksime, pensis la eta leporo.  Li jam estis tiom laca ke li ne plu povis elpensi ion ajn.





Tiam li rigardis super la arbustojn kaj la arbojn kaj spektis la grandan malhelan nokton.  Ne povus esti io ajn pli for ol la ĉielo.

« Mi amas vin ĝis la luno », diris la eta leporo kaj fermis siajn okulojn.



« Ho, tio estas tre for »,
diris la granda leporo.

« Tio estas tre, tre for. »

La granda leporo metis la etan leporon en lian foli-liton, kliniĝis super li kaj donis al li kison.



Tiam la granda leporo
kuŝiĝis apud la eta leporo
kaj flustris ridetante :

"Ĝis la luno…



… kaj reen ni amas unu la alian. »